

EKO 2013

Rekreita arĥivo de la ok postkongresaj komunikoj de la jaro, lanĉita sub la nomo 'Estraraj Komunikoj' kun la celoj subteni la landan agadon kaj la novan AMO-programon.

Sendita el Budapeŝto, la 6an de decembro. Vortoj: 340. Temo: Nova varbilo de ILEI.

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne)

Poste al: Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

Karaj,

Mi volas dividi kun vi flugfoliojn, kiujn ILEI pretigis por dismeti la edukajn argumentojn por Esperanto, kaj konigi sian ligan ekster nia komunumo. La tuja bezono estis la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en oktobro, kie UEA kaj ILEI ambaŭ sukcese aperis. La varbilo estas dulingva, por ke legantoj havu impreson pri la aspekto de la lingvo, kaj povas konstati, ke ili eĉ komprenas ĝin iugrade – ĉar en la rondoj, kie oni disdonas ĝin oni rajtas supozi, ke la partoprenantoj ĝis iu grado komprenas iun aŭ iujn hindeŭropajn lingvojn.

Vi vidas, ke koncizaj ili ne estas; do la celo ne estas por amasa disdono en stratbudoj al ajnaj preterpasantoj. Por tio oni havas aliajn flugfolioetojn. La nuna eldonaĵo estas por dono al konferencaj delegitoj aŭ edukistoj kun kiuj oni jam starigis kontaktojn, kaj kies intereso estas jam stimilita sufiĉe, ke ili volonte enrigardos la proponon iom pli profunde.

Ni disponigas la varbilon al vi en elektronika formo. Ĝi aperis en presita formo en nur malmultaj lingvoj kaj en malgrandaj eldonkvantoj – pere de propraj rimedoj plus sumo disponigita de UEA. La ligo aldonos pliajn lingvojn laŭ siaj fortoj kaj ebloj.

Se vi dezirus utiligi ĝin en fizika formo, kontaktu la prezidanton de ILEI, s-ino Mirejo Grosjean, por ricevi permeson mem presi ĝin vialande, aŭ konvinki al ILEI fari tion por via lingvo. Komprenoble, ILEI volonte ricevos tradukojn en pliaj lingvoj, sed pro buĝetaj konsideroj, ĝi ne povos promesi la fizikan presadon en dudekoj da lingvoj. Bv. starigi kontakton kun UEA (do, kun mi) ankaŭ se vi volas ĉerpi nur la argumentajn partojn el la broŝuro, sen la specifaĵoj pri ILEI. Efektive, mi ludis aktivan rolon en la formulado de la teksto.

Iom post iom en la retejo de UEA ni volas disponigi pere de informbanko ĉiuspecajn varbilojn kaj helpilojn – kaj por interna kaj por ekstera varbado. Jen komence – solida kontribuo farita de niaj instruistoj.

Kore,

SMG



Nova servo de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, lanĉita en julio 2013, kaj seninterrompe liverita depost tiam, per 264 komunikoj.

